

Novaĵoj Tamtamas



Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

NIAJ PLANOJ

ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama.

*Regulaj Klasoj en sabato: Daŭriga Kurso / Mezaj Klasoj 1, 2 kaj 3 / Jokohama Salono.

*Regula Klaso en merkredo

Hama-Ronda Vespero

jun. 18 (sab) 17h00-19h00, ĉambro 710

Temo: Vasilij Eroŝenko (en la japana kaj Esperanto)

Preleganto: s-ino ISAKI Miĉiko

Eroŝenko (1890-1952) estas rusa literaturisto sen vidpovo, kiu vivis en Japanio inter 1914-1916 kaj 1919-1921. Li verkis verkojn en Esperanto, la japana kaj la ĉina.

jul. 16 (sab) 17h00-19h00, ĉambro 710

Temo: Ekstersonoren : propra aspekto pri muziko, lingvo, teknologio...

Preleganto: s-ro SAEKI Hiroyuki (komponisto)

S-ro Saeki komponis en 2006, la verkon “... sed blinda celo”, influite de “Infana Raso” de William Auld.

TIEL OKAZIS EN LA HAMA-RONDA VESPERO

Hama-Ronda Vespero estas la tempo komuna por niaj rondanoj, ne dividitaj en lernoklasoj. Ĝi principe okazos en la 3a sabato de ĉiu monato, por 2 horoj post la 5a vespere, ĉe la regula kunveno. Ofte estas prelegoj, aŭ de rondanoj mem, aŭ de gastoj el aliaj rondoj aŭ eĉ de aliaj landoj. Ĝis nun en tiu ĉi jaro 2011 okazis jene.

●januaro 22: En la komenco, la 3 finintoj de la rudimenta kurso ricevis diplomon. Poste, oni diskutis ĝenerale pri la agado, prepare al la Jarkunveno, okazonta en la sekva semajno.

●februaro 19: 12 membroj diskutis, kiel daŭrigi la ĉi-jaran agadon de la Hama-Ronda Vespero.

●marto 19: NE OKAZIS pro la fermo de la kunveno post la granda tertremo en la 11a de marto. La anstataŭo okazos en la 18a de junio.

●aprilo 16: Prelegis s-ro SIBAYAMA Zyun'iti, nia rondano, pri la 16 Reguloj de Esperanto.

Laŭ li, la 16 reguloj, unue aperinta en 1887 de Zamenhof, kaj sankciita kiel netuŝebla fundamento en 1905 en la Unua Universala Kongreso, tamen estas destinitaj al kleruloj kun la scio pri hind-eŭropaj lingvoj, kaj tial estas malfacile kompreneblaj al japanoj. Li uzis esperantigitan tekston de la 16 reguloj, sed komentis japanlingve, precipe pri tiaj malfacilaĵoj. Post la prelego, 7 membroj kune vespermanĝis en apuda restoracio.

■ Eldonas Aida Yayoi ■ Redaktas la organa fako de JER: Miyazaki Hideko
■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jok-r-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

●majo 21: Prelegis s-ro Glauco POMPILIO, naskito en Italio kaj nia rondano, montrante bildojn, parolis sub la temo, “Ekskurso tra la misteroj de Romo”. En ĝi, li fokusis al la lokoj, kie onidire aperas fantomoj, aŭ okazis faktoj kuriozaj kaj misteraj.

Post la prelego, 11 membroj kune vespermanĝis en apuda restoracio.



s-ro Glauco POMPILIO



ESEOJ

Iom pri Hajko(1) AIDA Yayoi

Mi ŝatas legi hajkojn kaj utaojn, kaj fojfoje eltranĉas la versaĵojn el ĵurnaloj. Mi tamen ne havis intencon verki versaĵon en Esperanto. Lastjare s-ro Sibayama klarigis esperantan hajkon en nia klaso Salono kaj poste instigis nin praktiki hajko-faradon. Kun aliaj samklasanoj mi faris kelkajn hajkojn en Esperanto, sed trovis la provon tre malfacila kaj temporaba. Versi hajkon konsciante regulojn kiel prozodion, rimon, trokeon aŭ jambon estis super mia kapablo; kelkaj vortoj specifaj pri versoj konfuzis min. Dank'al la sugesto de s-ro Sibayama, ni ne bezonis fari klasikan hajkon sed la pli liberan kiel senrjuon. Malgraŭ tio per la 5-7-5 silaboj simboligi emocion estis laciga afero.

En mia memoro unu hajko farita de s-ro Hirotaka ankoraŭ vivas. Ĝi aperis sur ERAJ (Esperantaj Ret-Amantoj Japanaj) antaŭ kelkaj jaroj. Apenaŭ mi legis ĝin, ekblovis freŝa vento en mia koro.

**Kuŝanta kato
frapadas per la vosto---
aŭtuna pluvo**

La sceno tuj reliefigas katon duondormantan kaj pigre frapantan sian voston. Aŭtuna pluvo alvokas solecon en la tradicia japana kulturo. La du elementoj, aŭtuna pluvo kaj kata moveto, harmonias bone sur obskura fono.

Mi citu alian hajkon faritan de iu japana verkisto jam mortinta. La originalo estas ĉarma kaj naiva, restanta ĉe mi longe. Ĉi-okaze mi aŭdace traduku Esperanten la infanecan animon de la originalo, kun antaŭsento de malsukceso.

Rondega luno---
ankoraŭ postsekvas min
jam maturaĝa
(mangetu-ya otonani-nattemo tuite-kuru)

Japana tradicia hajko ĝenerale havas sezonvortojn, nepran por fari hajkon. Troviĝas multaj sezonvortoj en la hajk-almanako, per kiu oni povas vastigi kaj profundigi komunan senton kiel hajkisto. Tio estas granda avantaĝo, kaj tamen troviĝas problemoj en la kazo kiam oni volas esprimi ilin alilingve, ĉar mankas tie ekvivalentaj vortoj paralele funkciantaj same kiel la japanaj. Ekzemple, ĉu oni povus traduki per trafa esprimo la sezonvorton “keititu”, kiu signifas la tagon kiam insektoj finas vintrodormadon? Oni povus anstataŭigi ĝin per “frua marto”, sed tiam, laŭ mi, perdiĝus la nuanco algluita ĉirkaŭ la vorto “keititu”. Eble restus ne malgranda frustracio al la tradukinto.

En frua marto---
ĝoje iris ĉirkaŭen
kun la letero
(keititu-ya uresiki tayori moti-aruku)

Por elekti tipan sezonvorton multjare vivantan en la japana kulturo, oni devas pensi, ĉu ĝi efektive interŝanĝeblas kun alilingva esprimo sen perdo de originala vivanteco.

Turismo en Sapporo

2011-05-14

SIBAYAMA Noriko

Mi kaj mia edzo vizitis Hokajdon por partopreni en la 44-a Esperanto-Seminario. Profitante tiun ĉi okazon, ni turismis plu du tagojn. Ni elektis kurson por koncize trarigardi Sapporo-n per duontaga turisma buso. Nia aŭtobuso estis duetaĝa, kaj dudek kelkaj membroj de karavano sidis en la supra etaĝo. Nia ĉiĉeronino salutis, "Bonvenon en nian karavanon! En tiu ĉi karavano ni servas klarigon en kvar lingvoj per registriilo. Ĝi estas la koncepto de tiu ĉi karavano, pro tio mi ne gvidos vin en la buso, kvankam hodiaŭ troviĝas neniom da alilandanoj. Bonvolu aŭskulti gvidadon per kapaŭdilo." Tiam afabla rideto de la karavananoj plenigis la buson.

Unue nia buso celis iun ŝintoisman templon. La ĉiĉeronino diris, "Post via preĝo vi povos ricevi *manĝuon* senpage, do bonvolu manĝi en tiu budo." Do, ni unue purigis manojn kaj buŝon per la sankta akvo laŭ fiksita maniero, kaj preĝis. Poste kiel ŝi diris ni eniris en la budon por ricevi *manĝuon*. En la budo bona odoro de rostita *manĝuo* ŝvebis, sed ni devis atendi ĝis venontaj *manĝuoj* estos finrostitaj. Mi viciĝis por ricevi *manĝuon*, sed mia edzo sidis sur flanko benko. Post kelkaj minutoj la *manĝuoj* estis pretaj, kaj mi ricevis unu. Kiel kutime mi donacis duonon al li. La *manĝuo* estis ege bongusta ĉu ĉar ĝi estis ĵus rostita. Mi deziris manĝi unu plenan, kaj diris al li, "Ankaŭ vi viciĝu, do ankoraŭ unu ni ricevos." Sed mia edzo hezitis dirante, "Mia viciĝo ĝenos aliajn gastojn, ĉar en la budo estas multaj homoj." Laŭ mia supozo li nur sentis honton, ke li viciĝos inter virinoj por ricevi nur unu *manĝuon*. Li foje fariĝas tia vantomulo. Finfine ni povis manĝi nur duonon da *manĝuo*. Ĉu li kulpas pri tio? Eble ne. Ĉar mi konfesu, ke tiu, kiu donacis oferon je preĝo, estis nur mia edzo. Jes, fakte



po duono da *manĝuo* taŭgas al ni.

En la sekva tago ni vizitis la Ĝardenon de Maruyama. Tie multaj homoj ĝuis bankedon sub sakuro, kiu baldaŭ floros centprocente. Mi rimarkis, ke tie manĝobudoj tute ne troviĝas, kaj multaj grupoj mem rostas viandon aŭ legomojn. Ĉu tio estas bankeda stilo de Hokajdo? Ĉi-jare ni trifoje ĝuis sakuron: unue en Okinavo en januaro, due en Jokohamo en aprilo kaj trie en Sapporo en majo.

Trarigardinte ĉi tiun vojaĝon, mi sentis malmultiĝon de alilandaj turistoj. Ni vojaĝis Hokajdon ankaŭ lastjare, kaj tiam ĉie ni aŭdis ĉinan lingvon, sed ĉifoje ni neniam aŭdis la ĉinan lingvon sed nur unufoje la korean.

Avĉjo kaj avnjo(1/2)

2011-05-14

KOYAMA Takesi

1. Avĉjo

lutage gesinjoroj ne junaj veturis per tramo al Jokohamo. Kiam ili eniris en la tramo, la knabeto kun juna patrino diris al la sinjoro kun blankaj haroj.

"Avĉjo, bonvolu sidiĝi."

Sed li ne respondis ignorante la knabeton. Denove la knabeto diris.

"Avĉjo, avĉjo, ĉi tie, ĉi tie."

Sed senvorte li deiris de la knabeto, rektigante sian dorson.

Poste la edzino demandis lin.

"Kial vi ne akceptis la peton de la knabeto?"

"Kial? Mi ne estas avĉjo nek maljunulo."

Li diris kun kolera tono, ĉar li opinias ke li havas blankajn harojn multe, tamen li ne havas kurban dorson diference de la japana imperiestro.

Ŝi pensis kun maldolĉa rido ke li opinias sin juna, sed fakte maljuna.

Aŭdante la rakonton lia amiko diris al li.

"Ne pretendu esti ne maljuna, vi estas sendube maljunulo laŭ knabeto, ĉu ne? Kiam oni renkontis knabeton, oni devas rememori sian infanecon kaj respondi al li kun knabeca koro. Tio estas devo de maljunulo. Ĉu ne?"

(daŭrigota)

BELETRO



Mirinda Ĉapelo (3)



[de ĉi tie, trad. de SIBAYAMA Zyun'iti]

- 3 -

Post kelka tempo la diablo malfermis siajn okulojn, trovis ke ĝi iras denove sur homamasa strato, kaj ke la dande vestita sinjoro svingadis bastonon kaj marŝadis grimace. Ĝi konjektis, ke li malsatas, kaj tiu penso elvokis subitan ridegon, "ha, ha, ha, ha". Ĝi mem estis surprizita je tiu voĉego kaj streĉigis la kolon, iel sentis malvarmon, kaj ternegis, probable pro malvarmumo dum la dormeto.

La sinjoro mirigite haltis. Sur lia kapo okazis rido, kaj sekvis terno. Li tute ne supozis, ke li metis sur si ĉapelon elformitan el diablo, kaj tial jen ĉirkaŭen rigardis, ĉielen gvatis, kaj kun mieno de sin-perdo li enpenisigis;

"Strange."

Tiam denove blovis vento. La diablon rekte alblovis la vento, igis ĝin denove ternegi.

"Ho, kio?"

Jam la sinjoro rimarkis pri la ĉapelo sur si, kaj provis preni ĝin per mano. La diablo sentis sin ne helpebla. Se la sinjoro prenis sur si la ĉapelon kaj enrigardus, estus la fino. Ĝi ekdubis kion fari, tamen ĝi sukcesis havi bonan ideon. Kiam la kapo de la sinjoro iom kliniĝis, la ĉapelo kvazaŭ elblovite, malsupren saltis sur la straton, kaj forkuris turnante sin rade.

[de ĉi tie, trad. de NAKAGAŬA Teruo]

- 4 -

La sinjoro vidis, ke lia kara ĉapelo estis forportita de la vento, kaj li postkuris ĝin. Estus grava afero por la diablo se ĝi estus kaptita. Kun granda peno ĝi ruliĝis kaj forkuris. La sinjoro postkuris ĝin forte kaj rapide. Post nelonge, multaj homoj vidis ke belega sinjoro kaj ĉapelo estas vetkurantaj, kaj ili akompanis ilin kun plezuro.

"Ĝi estas bone ruliĝanta ĉapelo."

"Ĝi estas kvazaŭ viva."

"Ĝi estas stranga ĉapelo."

"Ni kaptu ĝin. Kaptu."

Multaj homoj postkuris kune kun la sinjoro.



La diablo pensis ke se ĝi estus kaptita, la fino venos, tiel ĝi turniĝe ekforkuris furioze.

Ĝi turniĝis tiel tre multfoje ke ĝi vertiĝis, kaj survoje por forkuri blinde, ĝi alvenis al iu ponto, tamen ĉar ĝi eraris la vojon, ĝi enfalis en la riveron unumomente.

"Ĝi falis en la riveron."

"Ĝi gape flosas."

"Alportu stangon, stangon."

[de ĉi tie, trad. de Mizro Iwaya]

Multaj homoj komencis bruadi tie kaj ĉi tie.

La diablo, falinte en la riveron, tute konfuziĝis kion fari, sed baldaŭ ĝi reakiris trankvilon. Ĝi trovis la brilantan sunon, riverborde kiantan homamason kaj ankaŭ domaĝmienen, dandan sinjoron.

"Nu, kien forkuri mi povas?"

Cerbumante ĝi rigardadis ĉirkaŭ si kaj trovis sur la borda ŝtonmuro rondan faŭkon kie elfluas malpura akvo en la riveron. Ĝi flare kaptis kutiman rancan odoron.

"Jen tie!" La diablo kriis en la koro. "Mia loĝejo trovita. Jen la elirejo de kloaka akvo."

Ĝi ŝajnis sin fluanta ĉapelo kaj fakte eknaĝis al la faŭko kaj haste plonĝis en ĝin. Homoj sur la bordo falis en tumulton.

"La ĉapelo naĝis!"

"Ĝi plonĝis en la kloakon!"

"Fantoma ĉapelo. Fantomo!"

"Mirinda ĉapelo!"

Ili kriaĉis unu al la alia kaj enrigardis la kloakan tubon. Sed la ĉapelo tute malaperis el ĝi.

Nun la ĉapelo reakiris sian formon de diablo. Ĝi vidis multajn homojn tra la faŭko de la kloako kaj netrovite rampis al la profundo.

"Ja estis danĝere. Tamen mi estas savita. Nu, ial estas malvarme. Eble mi malvarmumis pro la malofta frandaĵo kaj la dormado sur la kapo de la sinjoro."

Ĝi refoje ternegis laŭte en la malluma profundo de la kloako.

[la fino]

